

Rakontoj de Liĉjo

(Sed ne pli gajaj, ol en la unua kolekto)

Dua Volumo

Vi rajtas adapti kaj redakti la jenajn rakontojn laŭplaĉe. Simple aldonu la atribuan "Originale Verkita de Liĉjo MILLER".

You may adapt and edit the following stories however you wish. Simply add the credit "Originale Verkita de Liĉjo MILLER".

Enhavo

<u>Paĝo</u>	<u>Rakonto</u>
3	<i>Alina</i>
5	<i>Bona Restoracio kun Bona Amiko</i>
7	<i>En La Arbaro</i>
8	<i>Francisko kaj Ronaldo Estis Edzoj</i>
10	<i>Ĝardeno Poemo</i>
12	<i>Hotelo "Esperanto"</i>
14	<i>Johano Malkovris Esperanton</i>
16	<i>La Ligna Skatolo de Mia Praonklino</i>
19	<i>La Magia Ventumilo</i>
21	<i>La Ogro</i>
22	<i>La Plej Feliĉa Tago</i>
24	<i>La Ŝranketo</i>
27	<i>La Tri Musoj</i>
29	<i>Mi Havas Amikon</i>
31	<i>Mia Amiko Henriko</i>
33	<i>Mike</i>
34	<i>Paco Ĉie por Ĉiu</i>
35	<i>Patro kaj Fileto en Parko</i>
37	<i>Senkorpa Mistero</i>
39	<i>Tendaraj Tagoj</i>
40	<i>Unuflanka Konversacio</i>

Alina

Mi estis malfortika knabo, kaj ofte malsanis dum mia infanaĝo. Kaj mi ĝenerale estis malgaja, pro tio, kaj pro la fakto ke ne estis aliaj infanoj proksime en la kvartalo. Pro la diversaj malsanoj mi kutime ne vizitis lernejon, ĉefe restis hejme, kie miaj gepatroj zorge atentis min dum la malsanaj tagoj, sed lasis min libera kiam mi pli-malpli bone fartis.

Nur estis Alina, samaĝa knabino kiu venis el iu apuda strato. Mi neniam certis pri ŝia hejmo, sed foje kiam mi devis kuŝi en la lito mi vidis ŝin sur la trotuaro antaŭ mia domo, aŭ en la parketo trans la strato. Mi ĉiam pensis ke ŝi aspektas egale malgaje kiel mi.

Frapis min tre serioza malsano, kaj miaj gepatroj sidis apud la lito preskaŭ konstante, la kuracistoj kaj flegistoj venis kaj foriris . . . sed finfine mi povis ellitiĝi, kaj paŝi, kaj iom ludi, kaj miaj gepatroj reiris al siaj ĉiutagaj devoj kaj laboroj.

Estis tago post kiam mi estis tiel malsana, kaj mi vagis eksteren. Sur la trotuaro mi renkontis ŝin, tuj. "Saluton, mi estas Alina" ŝi diris. Kaj mi prezentis min al ŝi, same ĝentile. Ŝi ridis, mi ridis, kaj ni forkuris al la transstrata parketo, kie ni ĉasis unu la alian kaj kriis kaj ridis kaj falis sur la teron ĝis la malfrua posttagmezo. "Ĉu vi revenos?" mi diris. "Certe", ŝi respondis. Kaj tiun nokton mi endormiĝis envolvita en la plej feliĉaj pensoj de mia tuta mallonga vivo.

Kaj tiel estis. Kiam ajn mi estis sufiĉe bonfarta, mi eliris, kaj preskaŭ ĉiam tuj renkontis Alinan. Ni tuj forkuris, por kune trovi aventurojn. Foje ni ludis "Spiono!" kaj gvatis la maljunajn najbarinojn. Foje ni promenis bonkondukte laŭ la trotuaro, preter la butikojn, kaj mienis sinjore kaj sinjorine. Foje ni iris en la bibliotekon, kie ni ĉiam provis trovi la plej malnovajn librojn sur la bretaroj, por kune miri pri la malnovaj bildoj kaj flari la belan odoron de la flava papero.

Iun tagon Alina diris, "Amikĉjo, venu kun mi!" kaj kompreneble mi tuj sekvis ŝin. Ni kuris laŭ la stratoj, iom pli foren ol kutime. La tago estis bela, kaj la vento estis plaĉa kaj freŝa. Ni alvenis al granda, bela barilo, paŝis ĝis la pordego, kaj tie estis ŝildo "Tombejo de Sanktuloj Petro kaj Paŭlo".

"Alina", mi diris. "Tiu ĉi estas tombejo. Tia loko estas nur por plenkreskuloj. Ni ne rajtas eniri aŭ ludi ĉi tie."

"Karulo!" ŝi ridis. "Ne estu stulta. La pordego ne estas ŝlosita, kaj vidu--ĝi simple estas granda parko, multe pli granda kaj bela ol la parko transe de via domo!"

Mi cerbumis. Ŝi certe pravis. Ne estis ŝildo kiu informis ke "Infanoj restu for!". Kaj ja estis enorma, vasta spaco, kun belaj, grandaj arboj, verdaj razenoj, serpentumaj trotuaroj . . . Do, "Kial ne?" mi nur duonhezite respondis. Kaj ni enkuris.

Ŝi pravis! Bela parkego, grandaj razenoj. Apenaŭ estis aliaj homoj, nur kelkaj kiuj vizitis en distaj partoj de la tereno. Ni kuris, ĉasis, ridis, eĉ trempis la piedojn en plurajn el la belaj fontanoj kiuj troviĝis diversloke. Ĉie estis kriptoj kaj tomboŝtonoj, sed ili tute ne ĝenis nin. Estis kvazaŭ ludi en ĝardeno de skulptaĵoj. Mia familio iam konis skulptiston, kiu nomiĝis Helena, kaj mi tre ŝatis ŝin.

Elĉerpitaj, ni haltis ĉe barilo de feraj stangoj, kaj enrigardis. Jen staris du tomboŝtonoj, simplaj, belaj, puraj, bone prizorgataj.

Sur unu estis la nomo de Alina, sur alia mia.

Kaj ni daŭre ludas, kuras, ĉasas, kriĉas, kaj falas sur la teron en la kvartalo. Kia bela vivo.

Bona Restoracio kun Bona Amiko

Mi lastatempe kun bona amiko vizitis etan restoracion en al mi tute ne konata kvartalo de la granda urbo. La ejo estis malgranda, malhela, kaj ne facile videbla de la mallarĝa strato.

"Venu", diris la amiko. "Tiu ĉi estas mirinda loko. Vi neniel kredos la sperton manĝi ĉi tie."

Ni eniris, kaj silenta virino gvidis nin al eta tablo en angulo.

Preskaŭ tuj aperis alstatura, magra kelnero de netaksebla aĝo. Same kiel la virino ĉe la pordo, li aperis kaj staris silente . . .

"Mi ŝatus mendi la . . ." diris la amiko.

"Bone, sinjoro, mi portos al vi la . . . ĉu sen, aŭ kun?"

Mia amiko rigardis min dum momento kaj diris, "Ho, nepre sen, ĉi-foje."

Mi diris "bona amiko". Mi klarigu, ke ni ne estas intimaj amikoj, sed laboras en la sama kvartalo urbocentre, kaj preskaŭ ĉiutage vidas unu la alian, kaj foje trinkas kafon kune . . . ĉi-vespere ni la unuan fojon eliris por iom diboĉi, kaj antaŭ ol alveni ĉe la restoracio mi jam estis pli ol duone ebria. Tute plaĉe. Sed la restoracio ne efektive tute plaĉis al mi.

Post kelkaj minutoj la magra kelnero alpuŝis ĉareton, sur kiu estis nekutime granda kradrostilo.

"Interese" mi pensis. "Oni ne kutime kradrostas ĉetable. Jen io vere interesa!" Kaj sekvis lin la silenta virino kun dua ĉareto, sur kiu estis diversaj bovloj kaj kuir-instrumentoj.

Mia amiko denove diris "Vi ne kredos la sperton manĝi ĉi tie."

La kelnero okupiĝis pri preparoj, kaj poste metis sian manon sur mian ŝultron. Subite iu kaptis miajn manojn, tiris ilin malantaŭen, kaj mi sentis ke oni katenis ilin per dika glubendo. Mi ĉirkaŭrigardis sed estis sufiĉe ebria por ne klare vidi, kio okazas.

Mi aŭdis sonon de metalo kontraŭ metalo, kaj vidis ke la silenta virino alproksimiĝis kun longa tranĉilo, brile glima. Ŝi ridetis, kaj la dentoj estis . . . nu, pintigitaj, kvazaŭ per raspilo. Mi turnis la kapon al la kelnero kiu same ridis kaj montris la samajn dentojn . . .

"Oĉjo, Onjo" diris mia amiko, "Mi foriros nun. Li ja estas konato. Ĉi-foje la festo okazu SEN mi. Venontfoje, en ordo?" Kaj kiam li ridis, mi vidis ke ankaŭ ĉe li la dentoj estas iom pintaj.

Amiko? Ne precize. Konato, mi dirus. Sed li estis bona viro, kaj havis bonan koron. Mi scias, ĉar mi konservas ĝin en ujo, hejme.



En La Arbaro

Mi estas juna, atleta, kaj laŭ mia propra taksado antaŭ la spegulo sufiĉe bela. Ne rave, sed sufiĉe. Mi loĝas en mezgranda urbo, ĉirkaŭ kiu estas pluraj malgrandaj urbetoj kaj vilaĝoj, kaj kelkaj imponaj arbaroj. Mi tre ŝatas promeni en la arbaroj, foje sola, foje kun mia hundo.

Sed en mia urbo lastatempe okazis pluraj murdoj, ŝajne temas pri iu "seria murdisto", kiu ĝis nun mortigis pli ol dek homojn, en iliaj propraj domoj. Per tranĉilo, oni diras en la novaĵelsendoj. Mia patrino diras al mi "Ne estas sekure! Mi ne volas ke vi foriru en la arbaron, kiel vi kutime faras! Mi konstante restas maltrankvila kiam vi estas for!" Sed mi zorge memorigas al ŝi, ke la murdoj okazas en domoj, ne en la arbaroj. Neniu viktimo estis trovita sub la arboj tie. Mi sentas min pli-malpli ekster danĝero, kaj mi tute ne emas ŝanĝi mian kutimon.

Hieraŭ posttagmeze mi promenis sola en mia plej ŝatata loko, proksime al unu el la vilaĝoj. Mi aŭdis ie en la distanco bruon, kvazaŭ de homo aŭ besto kiu puŝas sin tra densa vepro aŭ sub malaltaj branĉoj. Kaj mi frostiĝis. "Mi ne volas, ke iu trovu min ĉi tie, en la arbaro . . ." kaj mi kiel eble plej silente komencis leĝere, zorge paŝi en la direkto al la vilaĝo. Mi ne estis tre for, kaj post kelkaj minutoj mi vidis malgrandan domon rande de la vilaĝo. Estis lumo en la fenestroj, kaj iom da lumo en la strato. Kuraĝe mi ekkuris ĝis la pordo kaj firme, insiste frapis.

Malfermis la pordon maljunulo, kiu surprize rigardis min kaj salutis per "Ho! Saluton! Knabino . . . vi aspektas pala kiel fantomo! Kio okazas? Venu--en la domon, mi petas."

Mi duone balbutis "Mi estis en la arbaro, mi emas promeni tie, sed mi aŭdis bruon. Vi ja scias pri la murdoj en la urbo, ĉu ne? Mi pensis 'Ne, iu ne trovu min ĉi tie' kaj mi venis silente al la vilaĝo, ĝis mi vidis tiun ĉi domon . . ."

La maljunulo klare konsterniĝis, kaj ankaŭ li iom paliĝis. "Bone ke vi venis" li diris. "Mi ŝlosu la pordon. Kaj mi tuj telefonos al la polico. Se tiu murdisto venus ĉi tien, mi timus. Multaj emeritoj kiel mi loĝas en tiu ĉi kvartalo. La danĝero estus granda."

Mi malstreĉiĝis, kaj sentis min sekure. Li turnis sin al la telefono sur tableto en la koridoro. Kaj mi elprenis mian tranĉilon, kaj per unu glata movo tranĉis lian gorĝon.

Sur la strato, mi rigardis al la sekva dometo, kie estis lumo en la fenestroj . . .

Francisko kaj Ronaldo Estis Edzoj

Francisko kaj Ronaldo estis edzoj. Ili loĝis en ĉarma domo, kie ĉio estis normala. Antaŭ la domo estis floroj kaj arbustoj. Malantaŭ la domo estis herbaro kaj arboj.

Ĝis tiu tago.

“Ronaldo”, diris Francisko. “Io misas en la ĝardeno”.

“Kara, vi bone scias ke mi havas nenian intereson pri la ĝardeno. Mi apenaŭ konscias ke ni havas ĝardenon. Pri kio vi parolas?”

“Nu”, hezitis Francisko. “Eble vi devus veni, kaj rigardi”.

Ronaldo fintrinkis la kafon, stariĝis, kaj paŝis al la malantaŭa pordo, kie jam staris Francisko. “Vi aspektas iom pala, karulo”, li diris. “Kio okazas?” Kaj tiam li turnis la propran rigardon eksteren. Kaj ankaŭ li paliĝis.

En la malantaŭa korto, kie hieraŭ estis nur herbaro kaj kelkaj arboj, sed vere nenio interesa, staris . . . Nu. Mi ne scias kiel priskribi. Vitreca turo. El kiu lumis lumo. Supre de kiu estis nigra globo, kun du minacaj okuloj.



Ronaldo, profesoro de Mezepoka angla literaturo ĉe la loka universitato, ekfreneziĝis, kriis, kaj kuris al la ĉefpordo de la domo ĉe la alia flanko, kaj malaperis en la distancon.

Francisko, kiu laboris kiel sciencisto ĉe la Naciaj Geografiaj Servoj, tamen ekscivolis. “Kio ĝi estas?” li diris al si. “Se venis jam la fino de la mondo, eble mi almenaŭ iomete sciu pri la afero.”

Li eliris, alproksimiĝis la turon, rigardis ĝin. Neniu sono. Neniu reago. Nur la interna lumo, kaj la minacaj okuloj.

Iom spontane, li metis la manon sur la flankon de la bazo.

Kaj subite: “En tiu ĉi turo estas la animo de la plej granda saĝulo kiu iam ajn vivis en la historio de la universo. Post la morto li decidis ne malaperi, kiel kutime, sed meti sin ĉi tien. Tiu, kiu scias la ĝustan peton, povas elvoki lin. En momentoj de krizo, li revenas kaj provas, ĉu troviĝas inda elvokanto”.

Francisko prenis paperon el la poŝo kaj bone notis. Poste pensis, “Ho, bone. Ĉio aĉas ĝuste nun. Eble mi provu.”

“Animo de la plej granda saĝulo, elvenu.”

Nenio.

“Venu, helpu min!”

Nenio.

“Mi estas via humila servanto. Bonvolu beni min per via konsilo.”

Nenio.

Kaj tiel plu.

Kiel sciencisto, li daŭre provis dum pli ol du horoj.

Finfine li ĵetis la paperon, sur kiu li zorge notis ĉiun provon, flanken. “Ho, fek’!” li kriis, kaj stamfis per la piedo.

“Saluton, Filo” venis voĉo de la turego. “Mi estas ĉi tie por helpi kaj konsili vin.”

Ĝardena Poemo

En de l' onklino la ĝarden'
Kreskas strangaj plantoj.
Kun grandaj dentoj
Kaj ungegoj
Kaj buŝegoj,
Kaj, ho, venen'!
Ĉu de homoj ja manĝantoj?

Venu, vidu, proprokule.
Vi decidu. Mi ne diras.
La onklinon
Mi tre amas
Ŝi ja havas
Bonajn morojn.
Por la gasto tre skrupule
Faras teon, oni miras
Pro la gusto
En la buŝo . . .
Infuzas el ekzota guŝo.

Kara, nun al la ĝarden'.

"Mia onklo" l'onklin' diris
"Tra la mondo ĉien iris,
La kolekton li akiris
Kaj reportis
Al ĝarden'."

Kara gasto, vi hezitas.
Se l'onklinon vi vizitas
Estas dece trinki teon
De la kara, ama man'.

"L'onklo pro laboro ŝvitis
En ĝarden', kaj li ekglitis,
Falis, frapis la kranion
kontraŭ trotuara pad'.

Mi de mia ĉambro vidis
Ke li falis, kaj rapidis
Al la pad' por helpi lin
Laŭ plej plena forto.

Sed. Kiam al la lok' mi venis
Mi ja vidis, kaj mi svenis.
Kaj kiam mi vekigis iam en la sekva tag' . . .
Nebula kapo . . . mi ne komprenis . . .”

Kara gasto, trinku pli.
La teo estas eksterordinara!
Infuzita nur por vi,
De mia onklino, la plej kara.

Kara gasto, ho, ĉu vi
Dormemon sentas en la kapo?
Tiel frue! Sed ripozu ĉi
Tie sur ĝarden-kanapo.

“Kara Onklino! Mi aranĝis.
Viaj plantoj lin jam manĝis.
Sed amiko estis li!
Mi ne volas fari pli!”

“Kara nevo, mi komprenas.
Al ĉiu tasko fino venas.
Plian helpon mi ne volas.
Kaj pro la perdo mi konsolas.
Terura, la dolor'.
Pro l'onklina kor'
Venu apud min, ho kara,
Forgesu pri l'amara ag'.”

.

“La nevo endormiĝis sur
La kanapo ĉe la ĝardena mur'.
Kia kara knabo, kun bona kor'.
Li restos ĉiam en mia memor'.”

Hotelo "Esperanto"

Mi estas la posedanto, la estro, la ĉefgastiganto de Hotelo "Esperanto" en nia bela urbo. Mi humile konfesas ke mi estas ankaŭ la ĉefkuiristo en nia restoracio, kaj la tubisto, laŭ bezono. Mia amikino Charlotte estas la librotenisto, kontraŭ . . . nu, pri la hotelo mem:

En nia strato ĝi estas eksterordinare bela. La urbo iom grumblis kiam mi farbis la konstruaĵon verda, sed pro mia persisto ili konsciis pri mia saĝo. "Venu al Strato _____, kaj nur rigardu, kaj jen la hotelo!" Ne eblas ne tuj rimarki ĝin. Belega loko.



En la restoracio, oni povas mendi verdan salaton, avokadojn, pizo-supon, brokolon en la ĝusta sezono, glaciaĵon mentan aŭ pistakan. Kaj la freŝa akvo el nia puto ĉiam montras plaĉe verdan nuancon.

Ni disponigas al niaj gastoj modernan, belan naĝbasenon, en la malantaŭa ĝardeno.



Ĉambroj haveblas, amikoj! Ĝuste nun gastas maljuna Fridulfo, kiu luas sian ĉambron konstante. Charlotte diras ke liaj monataj pagoj tre gravas el librotenada vidpunkto. Li estas afabla, simpatia homo, kvankam oni malofte vidas lin. Efektive mi ne vidis lin dum sufiĉe longa tempo . . .

Kaj Onjo Irena, kiu same estas nia konstanta gasto. Ŝi parolas Esperanton, kaj oni diras ke ŝi iam eĉ vizitis Universalan Kongreson, eble en Vilno aŭ Hongkongo, aŭ ia simile fremda urbo. Ŝi havas papagon, sed ĝi

parolas nur angle, kaj kutime ne bruas dum la noktoj. Mi kredas ke ŝi havas hundon, sed ankaŭ ĝin mi ne vidis dum longa tempo . . .

Venu, gastu ĉe ni! En ĉiu etaĝo estas necesejo kaj duŝejo. Ni provizas litotukojn kaj bantukojn, kaj la elektro malofte paneas. Niaj prezoj estas tre bonaj, kompare al la aliaj hoteloj en la urbo. Kaj al ĉiu gasto Onjo Irena donos unu senkoston lecionon pri Esperanto. Ne prokrastu!

Johano Malkovris Esperanton

Johano malkovris Esperanton. Aŭ eble Esperanto malkovris Johanon. Ne gravas. Estiĝis reciproka amo inter la du.

Johano eklernis, kaj diligente persistis. Li legis gramatikojn, lernolibrojn, vortarojn, blogojn, Facebook-grupojn, kaj eĉ presitajn librojn, daŭre, konstante, kiel pluvogutoj sur granito.

Ofte lia patrino diris al li, “Kara Johano, vi devus dormi iam, ĉu ne? Vi havos laboron morgaŭ.” Sed li apenaŭ aŭdis ŝin. Li estis fervora.

Foje lia patrino diris al li, “Kara Johano, mi kuiris por vi bonan vespermanĝon. Venu, kaj manĝu.” Sed li ne atentis. La homa animo ne vivas nur per manĝaĵo, sed per vera nutraĵo.

Venis tago en kiu la patrino trovis lin en la ĉambro, malvarma kaj malviva. Li apenaŭ estis skeleto, kun iom da haŭto kaj karno. Sed sur la vizaĝo estis klara, granda rideto.

En la Verda Ĉielo la Verdaj Anĝeloj feliĉe bonvenigis lin. Li trovis sin bele verde vestita, kaj tute fortika kaj bonstata. Kaj feliĉo plenigis lian koron.

“Kara Johano, vi donis vin al La Interna Ideo sur la Tero, kaj nun vi rikoltas la rezulton de viaj penoj. Venu, jen la Verda Ĉielo, kie ĉies espero plenumiĝas.”

Li estis tiel forte trafita de la emocio. Li apenaŭ kapablis respondi aŭ eĉ pensi. Sed finfine li elbuŝigis la vortojn “Karaj Verdaj Anĝeloj, mia plena feliĉo mi trovas ĉi tie, kaj mi dankas vi.”

TONDRO. FULMO. KRIĈOJ. ŜRIKOJ. Nigraj nuboj aperis, la Verdo tute forestis, kaj mornaj ploroj aŭdiĝis ĉie en la Verda Ĉielo.

Aŭdiĝis voĉo. “Sekvu la Ĉielan Vojon ĝis la sekva pordego. Tien vi iru, tie vi restu!”

Li ploregis, sed trenis sin for. Finfine li alvenis al pordego super kiu estis granda ŝildo “La Alia Loko”. Li frapis, kaj ne bonvenigis lin anĝelo, sed mezaĝulo kun longa hararo kaj sandaloj. “Ho, venu, amik’.

Trovu loko, faru kio ajn vi volas. En la fridujo estas pico de hieraŭ kaj malmultekosta biero. Iu helpos vi trovi loko kie dormi, kredeble.”

Kaj tiel estis dum Eterno. Grandega salono kun malnovaj sofoj. Sufiĉe da mezbona manĝaĵo. Lito en iu angulo de iu stranga domo, sed ne tute malplaĉa.

Sed ĉiam forestis kontento, pro manko de io . . .

La Ligna Skatolo de Mia Praonklino

En malnova ligna kesto, kiun mi ricevis post la morto de mia pra-onklino (kiu ricevis ĝin de sia pra-onklino, kiu, laŭ la familia tradicio iam migris el Samarkando . . . eble mi jam menciis tion), mi trovis malnovan lignan skatolon.

Ŝajne ĝi estas manfarita, el ia solida ligno, kaj la farinto bele ĉizis ĝin per folioj kaj . . . beroj? nuksoj? Al mi ili aspektas preskaŭ kiel la folioj de kverko, kaj glanoj, kiel tiuj kiuj ĉirkaŭas min hodiaŭ en Teksaso.



Mi ne povas malfermi ĝin. Kaj mi ekkonsciis antaŭ longe ke pri la aferoj de mia pra-onklino estas saĝe ne agi tro rapide. (Ĉu vi neniam legis alian #LiĉjoRankonton ?)

Se mi metas la oreton sur ĝin, mi kredas--sed ne ĵuras--ke mi povas aŭdi mallaŭtan zumadon, aŭ eble nebulan, foran melodion. Sed mi fariĝas maljuna, kaj ne tiel bone aŭdas. Povus esti en la skatolo nur silento, kaj zumado en mia kapo.

Mi kredas ke mi simple delikate metos ĝin sur breton (sufiĉe altan breton, for de la fingroj de la genepoj), kaj dum iom da tempo cerbumos pri la sekva paŝo.

Mi tre amis mian pra-onklinon, ĉar kiam mi estis knabo ŝi ĉiam donis al mi kuketojn kaj rakontis al mi belajn rakontojn. Ŝi foje diris "Venos tago, knabo, kiam mi devos instrui al vi plurajn aferojn pri nia familio . . ." Sed, frapis ŝin malsano, ŝi mortis (en tre tre maljuna aĝo, tamen), malaperis kun ŝi la "aferoj pri nia familio", kaj mi post iom da tempo ekposedis plurajn misterajn aferojn.

Kion vi diris, kara leganto? Ho, ne. Ĉio estas fikcio. Mi tute ne posedas tian kolekton de strangaj objektoj. Ekzemple, mi absolute ne posedas tubeton da sango de la lasta hom-ofero ĉe la Aztekoj. Nenie en mia domo estas korpeto de eksterterano, trovita en dezerto post kraŝo de NIFO. Kaj mi ne posedas spegulbovlon kiu sendas homojn al paralela mondo.

Sed pri la ligna skatolo, tamen . . .

Mi enlitiĝis pasintnokte, tute normale, kaj preskaŭ tuj endormiĝis. Sed post iom da tempo mi vekigis, kaj mi ĵuras ke mi aŭdis la saman zumadon. Mallaŭta sono, preskaŭ ia melodio, sed ĉi-foje la sono ŝajnis al mi malgaja, eble plenda. Mi ellitiĝis, surmetis la Crocs-ŝuojn, kaj paŝis al mia studĉambro, kie la skatolo kuŝas sur alta breto. Ĉe la pordo mi daŭre aŭdis la sonon, sed kiam mi enpaŝis en la ĉambron, silento. Mi iris al la breto, rigardis la skatolon. Silento.

Kiel mi diris, mi maljuniĝas, kaj tute eble mi nur aŭdis ian sonon en la kapo.

Mi reiris en la liton, kaj reendormiĝis. Sed post horo . . . ho ve. Jen la sama zumado, la sama morna duonmelodio. Kaj ĉi-foje mi kvazaŭ el fora distanco aŭdis kelkajn vortojn. "Perdita". "Forlasita". "Neglektita". "Ellasita". "Ignorita". Per raŭkaj, plendaj voĉoj ili atingis miajn orelojn. Mi ekhavis mensan bildon de malfeliĉaj abeloj, kiuj ĥoruso grumblis kaj kuntantis siajn malfeliĉojn.

Ĉi-matene, je aŭroro, do, mi iris en la studĉambron kaj prenis la skatolon de la alta breto. La malgaja melodio estis klare aŭdebla nun, la vortoj estis tute kompreneblaj, kaj krom tio estis mallaŭtaj frapsonoj, kvazaŭ iu batis iun, aŭ iu batis la murojn de subtera, sensuna ĉelo sub mezepoka kastelo. Tio ne helpis mian kreskantan senton de maltrankvilo, kiu iom post iom fariĝis timo, kaj poste sento de hororo. Mi bone memoras la horor-filmojn de mia juneco, en kiuj kompatinda viktimo estis forŝlosita, sen espero, kaj batis kaj kriis vane, ĉirkaŭita de ŝtonaj muroj.

"Sufiĉe!" mi diris al mi, kaj mi provis denove malfermi la skatolon. Neeble, malgraŭ pluraj provoj. Certe ĝi estas malfermebla, ĉar ĉarniroj videblas. Mi iris por ŝraŭbturnilo, sed ne trovis spacon por enmeti ĝin. Se normala metodo ne helpas, foje blasfemado utilas. "Je Zamenhof!" mi kriis. "Vi idiota skatolo, ĉesigu la zumadon!" mi kriis. Ĉio estis senefika. "JE LA FUNDAMENTO!" mi kriĉis. Sammomente mi stamfis per la piedo, kaj la skatolo malrapide malfermiĝis antaŭ miaj okuloj.


Nu, mi maljuniĝas, kiel mi jam menciis. Sed en tiu momento mi pliaĝiĝis dek jarojn en malpli ol duonminuto. Tiel estis la pezo de tio, kion mi vidis en la nun malfermita kesteto.

Karaj legantoj, eble vi volas vidi tion, kion mi vidis. Sed mi ne scias ĉu mi kuraĝas montri al vi la foton, kiun mi faris per tremantaj manoj.

Eble se iu petegus min, mi montrus la foton. Sed unue mi devus peti subskribon de dokumento kiu indikas ke mi estas tute senkulpa pri iaj rezultoj.

Nu, per tremantaj manoj mi kaptis la poŝtelefonon, ŝaltis la fotilon, kaj fotis. Poste mi falis sur la plankon, kaj ne povis movi min dum kelkaj minutoj. Kaj nun mi povas promeni nur per la helpo de marŝbastono, kiun mi konstante frapas kontraŭ la plankon.

(Nur fortaj kuraĝuloj rigardu la sekvan paĝon!)



Ĉi tien venas por pasigi
Eternon en senfina veado ĉiu
neuzita, forgesita, ellasita, kaj
ignorita n-finaĵo, el ĉiu lando
kaj el ĉiu epoko.

La kanto de malespero
neniam atingos sian finon.

La Magia Ventumilo

Iam estis knabo kiu havis ventumilon. Sed ĝi ne estis ordinara ventumilo. Ĝi estis magia ventumilo.

La knabo ricevis ĝin tute hazarde iun tagon, kiam li renkontis maljunan ĉinon ĉe la bazaro.

"Knabo", diris la maljunulo. "Venu ĉi tien. Mi montros ion al vi."

La knabo rigardis, kaj ĝi aspektis kiel ordinara ventumilo. Sed kiam la maljuna ĉino ŝaltis ĝin, subite en la aero aperis figuroj, kiuj ŝajne estis antikvaj soldatoj meze de granda batalo. Li malŝaltis ĝin, kaj la figuroj malaperis.

"Kiom ĝi kostas?" diris la knabo.

"Ĝi tiom multe valoras", diris la ĉino, "ke neniu povus aĉeti ĝin. Tial mi donacas ĝin al vi."

Tiun nokton, post enlitiĝo, la knabo mem ŝaltis la ventumilon. Tuj en la ĉambro estis granda batalo, du armeoj el antikva Ĉinujo, soldatoj batalis per klingoj kaj klaboj . . . kaj en iu momento la knabo sentis ion sur la vizaĝo, tuŝis ĝin, rigardis la fingron . . . kaj sur la fingro estis sango.

Li malŝaltis la ventumilon, kaj ĉio malaperis. Sed sur la fingro restis la ruĝa makulo .

La sekvan nokton, post enlitiĝo, li denove ŝaltis la ventumilon. Sed ĉi-foje li ne vidis batalon, sed grandan ĉinan palacon, kaj en malgranda, fora ĉambro estis juna knabineto kiu kaŝis kaj ploregis.

Senpripense, li kriis "Knabino! Kial vi ploras?"

Ŝi ekrigardis lin kaj diris "Mia patrino ĵus mortis, kaj mia patro estas for en batalo, kaj nun mi estas tute sola en la mondo."

Li malŝaltis la ventumilon, kaj ĉio malaperis. Li kuŝiĝis en la propra lito kaj longan tempon ploregis pro la knabino. Kaj sur la mano restis ŝiaj larmoj.

En la posta tago li prenis la ventumilon kaj reiris al la bazaro. Li trovis la maljunan ĉinon kaj diris "Estimata, mi redonas la ventumilon. Mi dankas vin. Per ĝi mi konscias ke milito kaj batalo kaŭzas sangadon kaj ploradon. Mi volas nek unu, nek la alian. Kiam mi plenkreskos, mi donos mian vivon por labori pri paco."

Kaj tion li faris.

La Ogro

Iam estis Esperanto-grupo en Urbo X. Ĝi estis vigla, aktiva, kaj tre plaĉa.

La membroj tre ŝatis kunveni, babili, manĝeti, trinki, kaj malstreĉiĝi kune.

Iun tagon, tamen, aperis en la grupo ogro, kiu ŝajne venis el la fora vastejo ekster la urbo. Ĝi sidiĝis, kaj diris nur "Grmf." Tamen, ĝia haŭto estis pure verda (krom kelkaj erupcioj, verukoj, furunkoj, ktp), kaj la membroj gaje bonvenigis ĝin. Pri la malbona odoro kaj la gutoj de salivo el la buŝo neniu aparte zorgis. Ne ĉiu ordinara membro de la grupo estis tre pura kaj alloga. La ogro feliĉe manĝis la restaĵojn de ĉies telero, kaj eĉ manĝis la telerojn. Anna Smith kaptis sian mansakon ĝustatempe antaŭ ol la ogro sukcesis manĝi ĝin. Paul Smith, bedaŭrinde, perdis sian ĉapelon.

Post monato la grupo kunvenis denove. Kaj denove aperis la ogro. Ĉi-foje ĝi sidiĝis kaj diris "Grmf-on", kaj ĉiuj gaje aplaudis pro la sukceso pri la lingvo. Anna Smith pensis brakumi ĝin, sed ne faris kiam ŝi konsciis pri la dikaj haroj sur la haŭto kaj la videbla ŝlimo. Oni mendis por la ogro rostitan kokon, kiun ĝi manĝis unuglute. Paul Smith perdis sian peruketon.

Kaj tiel estis dum kelkaj monatoj. Ĉiufoje aperis la ogro, ĉiam oni bonvenigis la novan samideanon, kaj ĝi daŭre progresis: Unufoje ĝi diris "mi", kaj alian fojon iuj pensis ke ĝi diris "RUKT", sed estas eble ke ĝi nur ruktis.

Venis la sezono por la tradicia pikniko de la Esperanto-grupo. Anna Smith proponis ke oni ekskursu eksterurban, al la fora vastejo, por festi kun la ogro en ĝia propra tereno. Ĉiuj laŭdis la proponon, kaj akklame akceptis ĝin.

En la piknika tago, la grupo iris for per diversaj aŭtoj, kun korboj da sandviĉoj, piklaĵoj, ĉipsoj, kaj dolĉaĵoj. Ili alvenis al la fora vastejo, kaj tie atendis ilin la ogro. Kune kun sia tribo.

Tio ĉi okazis antaŭ multaj jaroj, en la tempo de mia karmemora Avo, kiu konis la Esperantistojn en Urbo X sed kiu ne estis fervora adepto. Kaj ankoraŭ ne estas ia ajn spuro de Esperanto-movado en la urbo.

La Plej Feliĉa Tago

La Fina Venko. Dum jardekoj, preskaŭ jarcentoj, la parolantoj de La Internacia Lingvo sopiris al ĝi. La tago en kiu La Tuta Mondo finfine akceptos kaj ekuzos komunan idiomon. La vera “Esperanto-Tago”, kiu markos gravan punkton en la progreso de homa civilizacio. Nia Majstro revis pri ĝi. Verkis pri ĝi. Instigis al ĝi. Kaj inter la adeptoj ĉiam brulis la flamo de espero, la profunda konvinko ke La Tago iam venos.

Ho, pardonu. Mi prezentu min. Mi estas Miĥaelo, kaj jen mia edzino Manjo, kaj niaj kvar infanoj Bela, Bunta, Forto, kaj Johano. Mi kaj Manjo renkontiĝis en la Universala Kongreso en Milano, en la jaro 2032. Ŝi estas artisto, mi estas verkisto. “Pariĝo farita en la Ĉielo”, kiel oni diras. Pariĝo, geedziĝo, gepatriĝo . . . kaj efektive ni estis treege feliĉaj kaj sukcesaj. De la unua momento kunligis nian familion la amo al la Lingvo de D-ro Zamenhof. Kaj kiam komencis aperi la infanetoj ni zorge edukis ilin kiel denaskulojn. Hejme, Esperanto estas la lingvo por ni.

Pro sukceso en la du karieroj, ni enspezis sufiĉe por aĉeti belan terpecon en la montaro, kun ĉarma ĉaledo. La proksima vilaĝo havis bonegajn lernejojn por la etuloj, kiuj finfine devis lerni la nacian lingvon kaj integriĝi kun samaĝuloj. Sed vespere, hejme, ĉirkaŭ la vespermanĝa tablo, ĉiu konversacio okazis nur en la kara lingvo de la Doktoro. El “nia monto”, sur la balkono de la ĉaledo, ni povis vidi la valon, la proksiman vilaĝon, nebule la multe pli foran urbeton, kaj belegan pejzaĝon.

Ni reklamis Esperanton en la vilaĝo, kaj en la lernejo de la infanoj. Estis, kiel kutime, iomete da intereso, sed neniu vere kaptis la Internan Ideon kaj fariĝis Vera Samideano. Homoj kapjesis, estis afablaj . . . sed mi kredas ke ĝenerale ili “toleris”. Sed, kiel diris iu profesoro de filozofio en Usono (la nomon mi forgesis), eble la homaro bezonos 500 jarojn por esti “preta” por la perfekte bela ideo de La Doktoro.

Sed ne! Ŝajnas ke mirakloj ja okazas! En mia vivo, La Fina Venko ja venis! La tago, en kiu La Tuta Mondo parolas Esperanton. Mi kaj Manjo dancas. Ni kun la infanoj dancas kaj kantas. Manjo bakis belan kukon, kaj glazuris ĝin verda. Ni ĝuas grandan familian festenon. Mi neniam forgesos la daton: 22 februaro, 2043. La tago en kiu fariĝis klare ke la tuta homaro akceptas kaj scipovas Esperanton.

Post la gaja vespermanĝo kaj malaperigo de la kuko, ni sendis la infanojn al la litoj. Mi kaj Manjo, man-en-mane, eliris sur la balkonon. De nia monta loko, ni povis rigardi suben en la valon, kaj vidi la grandan

nigran truon kie estis la vilaĝo. Iom fore ni vidis fumnubojn kaj flamojn en la regiono de la proksima urbeto. La tutan tagon ni sekvis la novaĵon, dum urbo post urbo kaj lando post lando ekstermiĝis en la neevitebla lasta batalo. Ni notis lokojn sur la mapo en la salono, ĝis restis nenia dubo pri la vasteco de la detruo. Krom ĉe ni, en nia izolita monta ĉaledo.

Jes, la tuta homaro scias Esperanton. Mi, Manjo, kaj la kvar infanoj. La Fina Venko.

Post eble horo sur la balkono, ni iris finfine al la lito, kie ni ambaŭ englutis la pilolojn, kiujn ni jam donis al la infanoj en la trinkaĵoj kun la kuko.

Kaj la rakonton mi lasas, sen espero ke iu iam ĝin legos.

La Ŝranketo

Unu tagon maljuna virino alproksimiĝis al mi en la placo de nia urbo. Sen vorto ŝi enmanigis al mi lignan ŝranketon, fikse fermitan per du malgrandaj lignaj klapoj.

El stranga ligno, kiun mi ne rekonis.



Ŝi turnis sin, flustris “Ĝi nun estas via, ne malfermu”, kaj malaperis en la homamason.

Timige, ĉu ne? Sed mi estas praktika homo, kaj mi tuj ekzamenis la ŝranketon, kiu efektive ŝajnis esti speco de skatolo. Ronda truo, kiel vi povas vidi en la foto, kaj firme fermita, tiel ke mi ne povis malfermi ĝin.

Mi kunportis ĝin kun mi al mia hejmo, kaj cerbumis. “Ne malfermu”, diris la maljuna virino. Jen vera defio.

“PASVORTO” mi kriis al la ŝranketo. Kaj nenio okazis. “SEKRETAVORTO” mi kriis, kaj same, nenio okazis.

Fuŝ.

Efektive mi tre ŝatis la ŝranketon, kaj plaĉus al mi uzi ĝin por konservi kelkajn malgrandajn aferojn. Sed se mi ne povus malfermi ĝin . . .

“Diable!” mi kriis. Ke je tiu ĉi vorto estis kraketo, kaj la du klapoj ŝvingiĝis, kaj la ŝranketo estis malfermita.

Mi falis sur la plankon, senkonscia. Oni trovis min kelkajn horojn poste, kaj liveris min per ambulanco al la hospitalo, kie mi restis kelkajn tagojn ĝis mi ĉesis tremi tutkorpe.

[al la sekva paĝo, se vi ankoraŭ kuraĝas . . .]



Post tio, mi rezignis pri ĉia homa kontakto, kaj simple restas en mia domo, kie mi atendas la finan finon.

La Tri Musoj

Iam, antaŭ multaj multaj jaroj, tri musoj loĝis en tri mustruoj en la malsupra parto de la manĝaĵo-ŝrankego en la Reĝa Palaco. La unua nomiĝis Mus-Tardo, la dua nomiĝis Mus-Lino, kaj la tria nomiĝis Mus-Kolo. Mus-Tardo prizorgis la mus-manĝaĵojn, Mus-Lino faris ĉiujn mus-vestaĵojn, kaj Mus-Kolo batalis la Reĝan Katon por certigi ke la tri musoj restu sekuraj. Ili estis bonegaj mus-amikoj, kaj konstante aMUSiĝis . . .ho ne, tajperaro, pardonu min, amuziĝis.

Ĉiuj servistoj en la Reĝa Palaco konis la tri musojn, kaj dorlotis ilin. Eĉ la Reĝa Kato, malgraŭ tio ke ĝi havis devon agi feroce, kaŝe estis amiko, kaj nokte la tri musoj ofte rajdis ĝin tra la koridoroj kaj en la kortoj. Tio estis antaŭ la epoko de poŝtelefonoj aŭ kameraoj, kaj bedaŭrinde ne estas filmoj, sed ĉiuj kiuj vidis ilin atestis pri la ĉarmo.

Jen tri musoj. Ili ne estis blindaj, kaj vere ĝenis ilin kiam la infanoj de la Reĝa Palaco kantis la infankanton pri "Tri Blindaj Musoj". "Ne estas juste!" ili diris. "Ni ne havas propran kanton!" Sed krom tio, la vivo por ili estis vere roza. La, la la la la la, la, la vivo rozas . . . se vi nur ja aMUS min . . . Ho, pardonu, mi ne parolas nun pri Edith Piaf.

Alproksimiĝis la tago kiam la Reĝidino fariĝos 18-jaraĝa. Dum monatoj la Reĝa Palaco zumis pro preparadoj al granda naskiĝtaga festeno. Invitoj flugis ĉien al aliaj regnoj. Abundis manĝaĵoj en la manĝaĵo-ŝrankego de la palaco, kaj por diri la veron la tri musoj iomete dikiĝis. Mistere.

Per la Reĝa Poŝto iun tagon alvenis koverto, en kiu estis respondo al la invito, de Reĝido el fora regno, kiu diris, krom "Jes, mi ĉeestos, kaj mi elektos la kokaĵon por la vespermanĝo", "Mi venos kun la intenco peti la manon de la Reĝidino, ke ŝi fariĝu mia edzino kaj la estonta reĝino de nia lando".

Nu, jen la afero. Tiu reĝido estis nekonata al la Reĝo kaj Reĝino. Ili rigardis unu la alian, kaj diris "Reĝidoj nuntempe estas malfacile troveblaj." Sed la afero malsamas en la mondo de musoj. Musujo estas tutmonda komunumo en kiu oni parolas nur unu lingvon, la Musan, kaj per kurieroj kaj mus-poŝto interkomunikado estas tre rapida kaj sen bariloj obstinaj.

Venis informo al la tri musoj ke tiu reĝido estas . . . kanajlo. Bubaĉo. Trompisto. Fripono. Dando. Eksploatisto. Li jam trifoje petis la manon de tri reĝidinoj, kaj la rezultoj estis koŝmaraj.

La tri musoj kaj la Reĝa Kato kunsidis meznokte por preparoli la aferon, ĉar ili ĉiuj amis la reĝidinon. Ili trinkis vinon kiu gutis de la bareloj en la ŝrankego, kaj elpensis planon. “Ne estas eble” ili interkonsentis “ke tia fripono sukcesu ĉi tie. “ Kaj ili per la mus-poŝto sendis sekretan mesaĝon por peti helpon. Ili ne serĉis glavon sangon soifantan. Ili estis modernaj musoj kaj kato. Kaj ili certis pri sia sukceso.

En la tago de la festeno ja aperis la reĝido. Li estis belaspekta, oleeca, kaj lerta. La reĝidino iomete hezite interkonatiĝis kun li, kaj konsentis promeni kun li sur la longaj parapetoj de la Reĝa Kastelo. Ili promenis, kaj li babilis, kaj ŝi aŭskultis. Li parolis al ŝi pri ekonomiaj teorioj, historioj de diversaj militoj, kiel ripari ĉarojn, ktp. Ŝiaj okuloj rigardis al la fora distanco, kaj ŝi pli kaj pli ofte oscedis.

Subite antaŭ la paro aperis eta . . . mus-soldato. Kun ĉapo, rapiro, kaj pistolo. Li estis malgranda, sed aspektis tiel feroce ke la reĝido retroenpaŝis ĝis la balustrado de la parapeto, kie li perdis la ekvilibron kaj plongis suben en la ĉirkaŭfosaĵon de la kastelo, kie la Reĝaj Krokodiloj tuj formanĝis lin.

“Li estis sufiĉe teda”, diris la Reĝo kaj Reĝino.

“Li estis tedega kaj netolerebla”, diris la Reĝidino. “Prefere mi edziniĝu al bibliotekisto, aŭ ŝufaristo”.

“Nia kuzo Mus-Ketero ĉiam pretas veni kaj helpi en tempoj de bezono”, diris la tri musoj.

Kaj la Reĝa Kato ronronis kontente.

Mi Havas Amikon

Mi havas amikon kiu estas adepto de la internacia lingvo Esperanto. Krom tio, li ne estas tiel stranga. Nu . . . en la domo estas diversaj sonoriloj kaj muzikaj bovloj el strangaj landoj, kaj pluraj kristalaj globoj kiuj sidas sur drak-formaj tripiedoj. Kaj la eta botelo da bruna likvaĵo, pri kiu li ŝerce diris “Ho, amiko, tio estas restaĵo el la plej lasta azteka hom-ofero. ” Amuze. Kaj iun tagon li insistis ke li posedas la mumian kadavron de eksterterano, kiu pereis en kraŝo de NIFO. Granda ŝercemulo.

Hodiaŭ mi vizitis lin, kaj antaŭ la domo mi rimarkis tion ĉi:



Vitra telero, duonverda, duonblua, en kiu sidis pure klara akvo, sufiĉe por malsoifigi birdon aŭ ranon. “Kia bela objekto!” mi pensis, kaj klinis min proksimen por rigardi. Kaj tuj rektiĝis kaj skuis min pro ŝoko. Mi apogis min kontraŭ la muron mallongan momenton, kaj kuris en la domon.

“Amiko! Kio diable estas tiu objekto antaŭ via domo? Mi enrigardis kaj ne vidis la akvon kaj la foliojn sube, sed mi trarigardis kaj vidis fiŝojn, naĝantajn, kvazaŭ de sube. En verda akvo, kaj mi vidis la malsupron de eta boato kiu preterglitis . . . ”

“Ĉu?” diris mia amiko. “Kara, mi ne komprenas precize kion vi diras. Kiel io tia eblus? Ni iru kaj kontrolu--montru al mi tion, kion vi priparolas.”

Ni eliris kune, kaj malgraŭ la skuiĝo mi klinis min denove, kun li apude. Ni rigardis . . . kaj efektive estis nenio. Iomete da akvo, kristale klara, travidebla vitraĵo, kun brunaj sekaj folioj sube. La blua ĉielo estis super niaj kapoj.

Mia amiko rigardis al mi. “Do . . . ” li diris.

“Nu . . . ” mi respondis. Kaj mi etendis mian manon por tuŝeti la surfacon de la akvo.

“NE FARU, NE TUŜU ĜIN!” mia amiko kriis, sed tro malfrue. En la momento de tuŝado mi sentis fortan tiradon de la tuta korpo, spertis rapidan ensuĉadon tra ia fenestro, kaj tuj trovis min subakve--en klara, sed pure verda akvo--kun fiŝoj ĉirkaŭe kaj sunlumo ie supre.

Mi estas forta naĝanto kaj tuj puŝis min supren al la surfaco, kie mi enspiris profunde kaj ekkonsciis pri verda suno lumanta en verda ĉielo, super la verda akvo . . .

“Helpu!” mi kriis, kaj mi vidis la etan boaton, sur kiu estis fiksita granda verda stelo, kaj en kiu kelkaj homoj remis miadirekten per kunordigitaj movoj, kantante laŭtvoĉe

Jen la kanto de kuraĝ’
Por maristoj sur vojaĝ’,
Ĉar kuraĝon ĉiam donas melodi’;
Do kunkantu maristar’
Vi la rajton havas ĉar
La tutverda tajdo estas nun ĉe ni.

Kantu, cantu, kamaradoj,
Gloran estontecon havos vi:
Estas verda la ĉiel’
Ĉiam verdas nia stel’.
La tutverda tajdo estas nun ĉe ni.

Mi supozas ke mi svenis, ĉar mi poste vekigis sur lito en eta domo. Virino en kaptuko alproksimiĝis kaj proponis al mi bovlon da--verda--supo, kaj bulkon de verda pano. “Bonvenon”, ŝi diris. “Vi ŝajne ĵus alvenis tra La Fenestro. Vi nun estas en la verda duono, el kiu ni ne scias vojon reen.”

Kaj mi svenis denove.

Mia Amiko Henriko

Mi havis bonan amikon, Henriko, kiu estis unu el la plej afablaj homoj en la mondo. Li estis iom . . . nu "korpulenta" . . . kaj mi private nomis lin "Henriko la Dika" (ne "Henriko la Oka", sed pri tio iom pli, poste). Mia dika amiko Henriko. Li bone parolis Esperanton, kaj mi ofte vizitis lin en lia domo.

Unu tagon mi vizitis, kaj eniris la manĝoĉambron. Klare io estis nekutima. En la aero estis iom da fumo, kaj sub la tablo mi vidis lumon.

"Kio estas sub via tablo?" mi demandis.

Iomete konsternite, Henriko diris "Ho, hmm, nu, efektive, nenio. Kial?"

Mi ne estis naskita hieraŭ, kaj oni ne povas tiri la ŝaf-felon sur miajn okulojn tiel facile.

"Kara Henriko, ne estu stulta. Estas fumo en la ĉambro, kaj lumo sub la tablo. Kio okazas ĉe vi?"

Li ne volis rigardi min rekte. Li pensis, turnis la kapon tien kaj reen, kaj finfine diris "Ho, bone. Se vi devus scii, sub la tablo estas eta drako."

"Drako!" mi kriis. Kaj mi rigardis sub la tablon, kaj efektive tie estis eta, verdblueca drako, el kies buŝo venis fajreroj kaj fumnubetoj. Bela etulo. Kun flugiloj falditaj sur la dorso. Kaj glimaj okuloj. Kaj longa lango.

"Henriko. Neniu vere havas drakon. Diable, amiko. Kiel estas, ke vi havas tian besteton en via domo?"

"Nu", li balbutis. "Tie trans la strato de mia domo estas eta butikoj, kiun mi neniam vizitis, sed ial mi vizitis, kaj ili vendas drako-ovojn--granda ŝerco, ĉu ne?--kaj mi aĉetis, kaj rapide elŝeliĝis la eta besto kiun vi vidas tie. Mi trovas ĝin mirinda kaj ĉarma. Mi ne elpensis bonan nomon ĝis nun."

"Kaj kiam precize vi aĉetis la ovon?" mi enketis.

"Nur antaŭ du tagoj! Vidu, kiel granda ĝi jam estas! Ĝi jam manĝis miajn pantoflojn, ĉiujn kuniklojn el la ĝardeno, kaj la panon kiun mi planis manĝi ĉi-vespere. Kreskantaj etuloj bezonas sian nutraĵon!"

"Kiel oni kutime nutras tian beston, amiko?"

"Mi ne volas diri. Eble vi konsterniĝus."

"Henriko", mi diris. "Kie estas via edzino, parenteze?"

"Kiu?"

"VIA EDZINO! Ŝi kutime salutas min kiam mi vizitas vin. Eble vi memoras ŝin?"

“Ho”, diris Henriko. “Ŝi. Nu . . . ŝi . . . si . . . Ŝi vojaĝas. Eksterlande.”

En tiu momento mi ja iomete konsterniĝis. Mi aŭdis graŭlon el sub la tablo, flagris pli da fajreroj, kaj la fumo en la ĉambro dikiĝis.

Subite estis salto, atako, mordado . . . kaj mia kompatinda amiko Henriko estis ne plu. Mi ŝatus diri ke ĉio okazis tre rapide kaj sen doloro, sed . . . la drako estis malgranda kaj bezonis iom da tempo por pritrakti la tutan korpulentan korpon de Henriko la Dika.

Nun ĉe mi estas du belaj drakoj. Mi jam havis propran, kiun mi akiris antaŭ longa tempo. La nova etulo bone lernas de la pli granda. Kaj kiam mi aĉetis mian ovon, mi atentis la instrukcion ke oni simple tenu la orelojn por malsovaĝigi la beston al la mastro. Sajne Henriko prifajfis tian aferon.

Mi ĉiam bonvenigas ĉe mi la virinojn de la Atestantoj de Javeo, la vendistoj de novaj tegmentoj kaj kontraŭinsektaj servoj. Ili ĉiam miras pri miaj drakoj, je la unua (kaj sola) ekvido. La skoltinojn, tamen, kiuj vendas keksojn, mi simple forigas de la pordo. Mi tre ŝatas la keksojn kaj ne volas maltrafi ilin venontjare.

Mike

Mike Morris estis Prezidanto de la loka Esperanto-Klubo. Neniu povis memori kiam li ne estis Prezidanto. Kaj neniu ŝatis lin. Sed pro fidelo al Esperanto kaj la Interna Ideo, la membroj daŭre ĉeestis la monatajn kunvenojn.

Mike estis 50-jarulo, inĝeniero en iu nekonata fako. Li malkovris Esperanton antaŭ dudek jaroj, “lernis” ĝin, kaj tuj aktivis en la loka rondo. Li estis pompa, forta viro kun neŝanceblaj opinioj, kaj kiam li decidis estri la grupon, jen la fino. Li estris. Bedaŭrinde li neniam sufiĉe atentis la lingvon por bone paroli ĝin, kvankam li taksis sin tre kompetenta.

Angela Decker estis lia malo. Ankaŭ 50-jarulo, universitata profesoro de biofiziko, amatora lingvisto, kiu lernis Esperanton kiam ŝi havis nur 15 jarojn kaj parolis ĝin perfekte. Ŝi membriĝis en la loka grupo antaŭ du jaroj, kaj de monato al monato pli kaj pli konsterniĝis pri la stilo de Mike kaj la ŝajna malespero de la aliaj membroj, kiuj provis esti bonaj Verduloj.

Okazis ke la tagon de la sekva Esperanto-kunveno, oni trovis Mike apud lia lito, kovritan de sango, kaj kun stranga, tordita ponardo en la dorso.

La polico profunde esploris la krim-scenon. Neniuj fingrospuroj, ie ajn. Neniu indiko de luktado antaŭ morto, krom la kvanto de sango. La seruroj ne estis rompitaĵoj, tial ŝajne ili ne estis ŝlositaj. La ponardo estis unikaĵo, manfarita, kaj eĉ serĉado per Google montris nenion similan. Mike ne havis familion aŭ proksimajn amikojn. La policianoj vidis la Esperanto-materialojn en la domo kaj demandis al kelkaj klubanoj, sed ĉiuj senescepte estis ŝokitaj, eĉ se ne aparte tristaj.

“Paĉjo”, diris Angela al sia patro, amatora forĝisto. “Ĉu vi povus fari por mi duan ponardon? Tiun kiun vi faris por mi antaŭ longe mi perdis. Kaj mi tre, tre ŝatis ĝin.”

Dista kuzo, kiu venis por forigi aferojn el la domo antaŭ vendo, prenis de breto etan verdan volumon “Esperanto-English Dictionary by Montagu C. Butler”. El ĝi falis faldita folio, sur kiu estis skribita “Mike, jes, amrendevuo la matenon antaŭ la kunveno tute plaĉos al mi. A.” “Mistere”, pensis la kuzo, kaj ĵetis la folion kaj la libron en la rubujon.

Paco Ĉie por Ĉiu

Ekde la unua momento kiam ŝi surteriĝis sur la planedo, ĉio estis tiel fremda. Laodoro de la aero, la aspekto de la plantoj, eĉ la kvalito de la lumo. Sed kiel ĉiu trejnita membro de La Servo, ŝi estis tre adaptiĝema, kaj post kelkaj tagoj ĉe la ŝipo, for en neloĝata arbaro, ŝi estis preta por la misio. La Servo ĉiam prizorgis la vivon kaj bonfarton de ĉiuj raciaj specioj, sub la devizo "Paco Ĉie, Por Ĉiu".

Ŝi veturis do en la proksiman grandan urbon, kaj trovis loĝejon. La Servo ĉiam bone antaŭpreparis siajn membrojn, tiel ke ŝi havis monon kaj rimedojn. Ŝi enloĝiĝis, kaj komencis la unuajn surlokajn analizojn.

Al la Konsilantaro de La Servo jam venis indikoj ke sur tiu ĉi planedo efektive ne estis paco ĉie, por ĉiu. Sed oni ĉiam bezonas rektan observadon kaj taksadon de la reala situacio, antaŭ ol prepari la ĝustan vojon al paco.

Ŝi havis en la granda urbo aliron al multaj homoj, kaj rapide komprenis la fiziologion kaj psikologion de la specio. Kaj ŝi povis observi la funkciadon de la socio, kaj la metodojn de la registaro. Kaj fariĝis pli kaj pli klare ke ne, sur tiu ĉi planedo ne estis paco. Estis minacoj, atencoj, bataloj, perfortoj en ĉiu nivelo: inter individual homoj, en familioj, en la urbo, kaj inter diversaj grupoj. Ŝi ŝokiĝis pri manifestacioj en la stratoj, dum kiuj homoj detruis aferojn kaj vundis aliajn. Ŝi ŝokiĝis pri murdoj kaj aliaj krimoj. Ŝi ŝokiĝis pri raportoj de militoj en aliaj lokoj.

Post la ĉitiea analizado, ŝi entreprenis grandan mondvojaĝon, en kiu ŝi vizitis plurajn ĉefajn urbojn kaj plurajn malgrandajn urbojn. Ĉie la problemoj de konfliktoj estis je kriza punkto. Foje tamen ŝi trovis kelkajn pacemajn homojn, kaj kelkajn pacajn situaciojn. Malgaje, nur foje.

Finfine ŝi revenis al la ŝipo, en la fora kaŝita arbaro. Ŝi estis ekstreme laca, kaj elĉerpita. Post iom da ripozo, ŝi kontaktis la Konsilantaron de La Servo, kaj partoprenis en longa interparolado pri la malkovroj, la analizoj, la reala stato.

Estis decido pri la vojo al paco, kaj la ĝusta misio ĉi-planede.

Per la ŝipo ŝi iris en la atmosferon, kaj povis rigardi la globon sube. Ŝi ĝustigis la agordojn de la sistemo, kaj senhezite ŝaltis la mekanismon. Tuj, en ĉiu loko kiun ŝi vizitis, la ampolo kiun ŝi lasis, kaj en kiu estis la veneno, rompiĝis. La veneno disflugis en la aero, kaj ene de 24 horoj ĉiu racia estaĵo sur la planedo estis mortinta.

Kaj sur la planedo regis paco.

Patro kaj Fileto en Parko

lun tagon patro kaj fileto promenis en granda parko. Estis bele kaj malvarmete, kaj ili ĝuis la tempon kune.

“Paĉjo! Grandan hundon!” subite kriis la fileto.

“Kara”, diris Paĉjo, “en tia kazo oni ne bezonas la akuzativon. Sufiĉas diri ‘granda hundo’”.

“Sed mi celis diri ‘Mi vidas grandan hundon!’” diris la fileto.

“Hmm”, diris Paĉjo.

Iom poste la vetero ŝanĝiĝis, nigriĝis la ĉielo, ekblovis la vento . . . “Fortan ŝtormon!” diris la fileto.

“Kara”, diris Paĉjo. “Mi jam klarigis ke vi ne bezonas la akuzativon.”

“Sed mi celis diri ‘Ni spertos fortan ŝtormon!’” diris la fileto.

Kaj ambaŭ plene malsekiĝis pro pluvego, kun aŭ sen akuzativo.

Ili promenis pluen, kaj la fileto ekkriis “Paĉjo! Minacan urson!”

Paĉjo, ĉiam bonkora kaj pacienca, turnis sin al la fileto kaj klarigis “Kara, oni diras ‘Ho, jen minaca urso!’
La akuzativo ne estas bezonata.”

Kaj tiun momenton la urso, tri metrojn alta, eksaltis sur la patron, mortigis kaj disŝiris lin, kaj formanĝis lin komplete. Sur la herbaro restis nur la kravato, kaj la poŝ-gramatiko de Esperanto.

La fileton, kiu staris apude, ne rimarkis la urso, kiu post la manĝado forvadis en la arbaron.

La fileto kelkajn minutojn poste alpaŝis, prenis la gramatikon de la herbaro, kaj diris al si, "Kiam mi estos patro, mi atentos kaj akuzativon, kaj minacajn danĝerojn." Kiam li plenkreskis, li fariĝis fame konata instruisto de Esperanto, sed restis fraŭlo la tutan vivon.

Senkorpa Mistero

Iam estis maljuna Esperantisto, tre aktiva en la rondo de sia mezgranda urbo. Sed kiel ĉiam okazas por ĉiu mortemulo, iun tagon ŝi mortis. (Feliĉe ŝi mortis sur la strato antaŭ la apartamento, tiel ke la kadavro ne restis netrovita plurajn tagojn, kaj la multjara najbaro tuj adoptis la orfan katon. Ŝiajn Esperanto-librojn oni sendis al brokantisto, en kies butikoj oni ankoraŭ povas trovi plurajn bonajn titolojn, se vi hazarde estos en la urbo).

Iom poste ŝi skuis la kapon, ĉirkaŭrigardis, kaj ekkonsciis ke ŝi iel ŝvebas proksime al la plafono de konata drinkejo/restoracio en la urbo, kie la Esperantistoj ofte kunvenis dum ŝia vivo. Estis malpure tie ĉe la plafono, kaj ŝi provis forviŝi araneaĵon per la mano . . . sed kiel vi bone jam scias, ŝia mano simple trapasis eĉ la fajnajn fadenojn, sen efiko. Krom tio ke la araneo mem sentis ion nekutiman, kaj iomete retiriĝis.

Ŝi estis, dum la materia vivo, tre purema, kaj tiaj aferoj ne plaĉis al ŝi. Ankoraŭ ne plaĉis, ŝajne, eĉ postmorte. Sed preskaŭ tuj ŝi aŭdis konversacion ie sube, kun konataj voĉoj, kaj jen ĉirkaŭ granda ronda tablo sidis la urba Esperanto-grupo, ŝiaj amikoj kaj kolegoj kaj lernantoj. “Ĉu vi aŭdis, ke . . .” diris unu. “Mi ne povas kredi . . .” diris alia. “Kredu min, sinjorino” diris maljuna viro ĉe la tablo, “Mi vidis la okazon.” “Ŝi estis artisto, ĉu ne, ŝi kiu mortis?” diris kvara, iu nova homo en la grupo. “Almenaŭ ŝi mortis hejme, kaj ne en Venecio dum la lasta vojaĝo” diris kvina. Kaj iu mezaĝa viro ĉirkaŭrigardis kaj diris “Ni estu honestaj, samideanoj. Ŝi ĉiam estis sufiĉe ĝena, taksis sin ‘LA’ spertulo pri ĉio, kaj kiam ajn ŝi vojaĝis aŭ simple forestis niaj klubkunvenoj estis multe pli gajaj.”

Silento. Homoj gapis al li. Rigardis unu la alian. Kaj simple retenis la spiradon.

Dume ĉe la plafono estis kvazaŭ eksplodo de nevidebla ektoplasmo, kiam la senkorpa spirito aŭdis la lastajn vortojn. Nevideblaj strioj de nevidebla fulmo trakuris la ejon. La araneo ĉesis manĝi sian muŝon, lasis ĝin fali sur la tablon sube, eligis etan aranean ŝrikon, kaj forkuris el la konstruaĵo. “KION LI DIRIS??” diris al si la senkorpa mistero . . . “Kaj mi taksis lin amiko! Perfido! Certe la aliaj rapide defendos min!”

Sed post la longa momento de malkomforta silento, la kelnero alportis bierojn kaj manĝaĵojn, ĉiuj komencis manĝi kaj trinki, kaj baldaŭ estis gaja konversacio en la rondo. Sen iu ajn plia vorto pri la

forpasinto. Kaj ŝi, ĉe la plafono, pli kaj pli konsterniĝis pro mankoj de akuzativoj, malĝustaj vortelektioj, konstanta uzado de la nacia lingvo kaj ne Esperanto, nescioj pri gravaj aferoj . . .

La kreskanta kolero donis al la senkorpa spirito kroman forton, kaj ŝi flugis el la restoracio en la stratojn de la urbo. Ŝi serĉis viktimojn. Belan junulinon. Iun per kiu venĝi sin. Kaj baldaŭ vidis junan, belan studenton kiu promenis sur la urbaj stratoj. Enflugis en ŝian korpon kaj pro la forto de kolero ekregis la animon de la alia.

La pordo de la restoracio malfermiĝis, kaj enpaŝis bela juna virino. Ŝi alproksimiĝis al la Esperanto-tablo, mansvingis, kaj diris “Saluton! Mi estas Maria Smith-Jones. Mi ĵus transloĝiĝis al via urbo, kaj aŭdis ke kunvenas Esperanto-grupo. Mi pardonpetas pro la malfruo. Mi jam lernis Esperanton antaŭ kelkaj jaroj, kaj foje eĉ instruis ĝin. Mi esperas trovi la okazon esti aktiva en via grupo ĉi tie.”

La membroj varme salutis ŝin, bonvenigis ŝin, invitis ŝin en la rondon, ĉar vere en la grupo mankis bonaj parolantoj. Kaj Maria Smith-Jones sidiĝis ĉe la tavolo kun tre kontenta rideto sur la vizaĝo.

Tendaraj Tagoj

Chad ne estis tre feliĉa. Li ja konsentis tendumi kun la internacia junulara grupo, sed verdire li amis la urbon, ne la kamparon, kaj sidi sola en tendo ne aparte amuzis lin. Kaj li trovis sin iomete kiel “fiŝo ekster la akvo” en tiu ĉi kunularo. Bonaj junuloj, certe, sed tamen . . .

Oni anoncis la “Tendarajn Tagojn” tre entuziasme, reage al la lernolibroj de Stefan MacGill. “Oni konas la librojn, ni okazigu verajn tendarajn tagojn!” estis la ideo de la estraro. Sed finfine, kiam oni trovas sin meze de fora kamparo, meze de kampo, kun apudaj bovoj kaj ŝafoj kaj kaproj, kaj la sonoj de gajaj infanoj ie en la distanco kiuj ludis ekstere . . . nu, “Mi ne estis farita por tendumado”, amare pensis Chad al si.

Krom tio, dum la aliaj estis ie en vespera ekskurso, subite ekpluvis. “Diable” li pensis. “Kiel aferoj povus fariĝi pli malplaĉaj?” Aŭ eble pli plaĉaj, ĉar li aŭdis konatan voĉon ekster la tendo “Ho fek’, pluvas, kaj mi estas for de mia tendo. Damne!”

Chad malfermis la klapon de la tendo kaj kriis “Hej, Marko! Venu! Ĉi tien!” kaj post sekundo ensaltis altstatura blondulo, komplete malseka pro la neatendita pluvo. “Dankon, amiko! Ve, mi malvarmiĝas pro la akvo. Ĉu mi povus prunti sekajn vestaĵojn?”

Chad jesis, kaj Marko forigis la akvoplenan vestaron. Li sekigis sian haŭton per bantuko kiun Marko proponis.

La pluvo ĉesis, egale rapide kiel ĝi komenciĝis antaŭ nur kelkaj minutoj.

Marko rigardis eksteren al la nun klara ĉielo, sur kiu pendis brile luma luno. “Mirinde”, li diris.

Li turnis sin, kaj la lupfantomo tuj disŝiris lin, hurlis, kaj kuris for en la distancon. La sekvan tagon ne estis sonoj de gajaj infanoj ie ajn en la regiono. Kaj kiam la polico esploris la sang-makulitan tendon, ili ne trovis ĉiujn partojn de la dispecigita korpo.

Unuflanka Konversacio

Amiko, kara, sidiĝu mi petas. Trankviliĝu. Vi klare estas tro ekscitita.

Vampiroj? Ĉu vi ŝercas? Ne ekzistas vampiroj. Pri kio vi parolas?

Jes, kompreneble mi scias ke ili troviĝas en rakontoj el diversaj landoj kaj epokoj. Same feoj kaj drakoj, amiko! Jen, trinku iom. Ne estas iu danĝero ĉi tie.

Do jen. Vi ĵus diris ke vi mem vidis nenion. Kial do la timo, kaj tremado?

Kara amiko, mi loĝis en tiu ĉi kvartalo multajn jarojn. Tute sen timo. Mi eĉ ŝatas promeni vespere kaj nokte, kaj neniam supozas ke iu aŭ io minacas min.

Vidu, ni eliru kune. Mi montros al vi la stratojn ĉirkaŭe, kaj vi vidos: nur homoj kaj hundoj kaj katoj. Venu kun mi!

Jen la ĉefstrato, tre proksime al mia domo, ĉu ne? Butikoj, kafejoj, restoracioj, kuracisto, dentisto. Mi ofte vespermanĝas ĉi tie. Tie estas la malnova vilaĝa preĝejo, apenaŭ vizitata nuntempe. Kaj la bela parko, kie mi ŝatas promeni kaj malstreĉiĝi.

Kio? Vi frostas? Ho, amiko. Ni reiru al mia domo tuj. Mi pretigos kafon por vi. Venu.

Ĉu komforte nun? Trinku la kafon. Ĝi bone varmigis vin.

Mi vere ne komprenas vian streĉiĝon, amiko. Ni konas unu la alian jam multajn jarojn, kaj mi neniam vidis vin en tia stato. Estas malfrue--ĉu vi ne simple volas ripozi ĉi tie sur mia divano kelkan tempon, antaŭ ol iri hejmen? Kuŝiĝu. Vi tute ne ĝenos min. Jen kapkuseno. Ripozu, kaj poste mi akompanos vin al via apartamento.

Sed atendu momenton. Kio estas? Mi devus rigardi vian kolon . . .

Simplanimaj homoj. Ili ĉiam tiel facile konvinkiĝas . . . kaj sango en kiu estas iom da kafo estas ja la plej bongusta.